

ESPERANTA FINNLANDO

1962

N:o 2

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAJŬOJ

JARKOLEKTO 1962 — 9 numeroj
Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Emil Sten-
holm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, IIRIS-
LAHTI (artikoloj, novaĵoj, recenzoj,
interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj
societoj estas varme petataj konstante
kontribui per novaĵoj kaj interesaj
artikoloj, proponoj ktp., por ke nia
gazeto estu vera komuna informilo.

ON HEIKOSTI JÄRJESTETTY!

Eräässä seurueessa keskusteltiin kielitaidon merkityksestä. Kyseessä oli miesseura, jonka jäsenet olivat tottuneet enemmän tai vähemmän eksaktiseen ajatteluun; oli insinöörejä, matemaatikoita; varsinaisia kielimiehiä ei ollut ketään. Todettiin, että hyvin monilla aloilla kielitaidosta on suurta hyötyä. Jotkut joukosta opiskelivatkin jatkuvasti kartuttaakseen kielivalikoimaansa. Eräässä aikaisemmassa yhteydessä oli ollut puhe myöskin esperantosta. Kukaan ei sitä tuntenut, lukuunottamatta ainoata esperantistia joukossa. Esperantisti oli väittänyt, että kansainvälisen kielen oppiminen, vaikkei sellaisenaan toisikaan erikoisempia etuja, ainakin helpottaisi muiden kielten oppimista. Kyseessä oli valistunut ja ennakkoluuloton joukko, siksipä jotkut ostivatkin esperanton alkeiskirjan voidakseen omin silmin todeta pitikö väite paikkansa. Nyt oli oppikirjaa luettu muutamia sivuja, ja kielitaidosta keskusteltiin uudelleen. Erään mielestä esperanton lukeminen oli tavattoman humoristista, tuntui vallan huvittavalta se, että kieli oli todella tavatto-

man helppoa, ei tarvinnut muistaa peikkeuksia, jotka muodostavat luonnollisesti syntyneiden kielten »viihätyksen». Eräs joka ei ollut oppikirjaan tutustunut, kysyi jotakin, taisi olla näin: ovatko verbimuodot monikossa samanlaiset kuin yksikössä. Ovathan ne, ja mikseivät olisi. Mikseivät olisi! Suunnitelmakielen rakenteessa ei tarvitse olla tarpeettomia ulkoa muistettavia ominaisuuksia. Kaikki läsnäolevat olivat sitä mieltä, että esperanto on mainio asia, niin mainio, että se pitäisi väkisin opettaa mahdollisimman monille ihmisille. Todettiin, että on **tavattoman huonoa järjestelyä**, ettei suunnitelma-kieltä opeteta joka puolella maapalloa aivan virallisesti. Mukana olleen esperantistin oli mukava kuunnella, kun muut seurueen jäsenet, ei-esperantistit, esittivät aivan samoja ajatuksia, joilla esperanton kannattajat ovat vuosikymmeniä asiaansa puolustaneet. Pohdittiin vielä syitä siihen, että monet kielimiehet ja kielenopettajat ankarasti vastustavat esperantoa »kuolleena ja mekaanisena». Syitä arveltiin olevan kaksi: monen ammattitaito rajoittuu muutamien kiel-

ten taitamiseen, heidän merkityksensä vähenisi tuntuvasti, jos helppo yleiskieli olisi yleisessä käytössä. Toisaalta kieliä opiskelee paljon sellaisia henkilöitä, joiden taipumukset ovat enimmänsä ulkoa oppimisessa eikä loogisessa ajattelussa. Tällaiset ihmiset pelkäävät suunnitelmakieltä, joka johdonmukaisena miellyttää jopa matemaatikkoa. Pelko on kylläkin aiheuton, voihan esperantoakin oppia vaikka aivan ulkoa, välittämättä loogisesta ajattelusta mitään! Ehkäpä me esperantistit kykenemme, sitkeää ja toistuvaa valistustyötä tehden, vähitellen poistamaan sen huonon järjestyksen, joka on siinä, että monet ihmiset myöntävät esperanton suuret edut, mutta kieltä ei oteta virallisesti käyttöön missään.

Myyrä.

PRI FABELOJ KAJ LUDOJ

Estas al ni ĉiuj klare, ke infanoj amas ludi kaj tre ŝatas aŭskulti aŭ legi fabelojn. Jes, fakte ŝajnas, ke tio estas memevidente. Memevidenta ĝi ja estas, sed la psikologoj eĉ konstatis, ke ludoj kaj fabeloj estas por infanoj tute necesaj. La psiko de juna infano konstante estas tre impresebla, ĝin povas influi multaj aferoj. Kelkaj el tiuj influoj havas nur pozitivan efikon kaj donas al la infano senton de sekureco. Sed tre multaj el tiuj influoj estas tre negativaj, kaj plenigas la subkonscian parton de infanpsiko per fortaj sentoj pri timo, hororo kaj malsekureco. Se la infano ne ludas, ne kapablas al ludado, ĝi certe estas malsana. Se neniam fizikaj indikoj estas troveblaj (kiel ekz. febro k.s.) la malsaneco certe estas de mensa karaktero. La infano havas fortajn »malhelpojn«, kies kaŭzon oni devas trovi kaj klarigi, tiamaniere oni ofte kuracas tiajn malfacilaĵojn. Ankaŭ la infanoj kiuj ne estas danĝere mense malsanaj, ricevas grandan

kvanton de ĉiaj malbonaj influoj dum sia junaĝo. Kaŭzoj estas multaj, ilia propra neobeemo, patra aŭtoritato, neamo flanke de patrino, ĵaluzeco pri pli junaj gefratoj, propra konscienco, turmentemaj ludkamaradoj, tro severaj instruistoj, fizikaj malsanoj. Ĉiuj tiaj lasas siajn postsignojn en la psikon kaj tra tio ankaŭ en la nervsistemon de infanoj. Ordinare tamen infanoj faras sian propran psikoterapion per ludoj kaj aŭskultante fabelojn. La terapio okazas nature tute senkonscie, sed ĝi estas efika!

La malnovaj kaj bone konataj fabeloj de la fratoj Grimm, kvankam ofte ŝajne kruelaj, estas tre bonaj por infanoj. Por pensemaj kaj pri psikologio interesitaj gepatroj estas altvalore scii, kiujn fabelojn iliaj infanoj plej multe amas. Se iu kvar kvin- jara knabo ripete volas aŭskulti al la fabelo »Jakobo gigantomortiganto«, estas preskaŭ certe, ke li sin sentas, subkonscie, neforta kaj necerta. Aŭskultante tian fabelon, li metas sin en la lokon de la fabelheroo, tiel havante la kontentiĝon de venko, kian li malofte aŭ eĉ neniam en siaj normalaj homrilatoj ricevas. Se, siaflanke ies juna filino fojon post fojo petas sian patrinon legi pri Cindrulino, estas klare, ke ŝi sentas sin pli-malpli flankenŝovita. Eble ŝi havas pli junajn fratetojn, al kiuj la atento de la patrino multe fiksiĝas. Estas klare, ke la junaj beboj bezonas atenton, tion oni ne povas aliigi, kaj konvena fabelo estas bona konsolo, ĝi forprenas troan streĉitecon el la animo tiel ebligante mensan ekvilibron. Ruĝa-ĉapeto estis knabineto, kiu renkontis, anstataŭ sian bonan avinon, tre malbonan kaj malican lupon. Tiu ĉi fabelo plaĉas al preskaŭ ĉiuj infanoj. Tion oni povas klarigi per tio, ke la patrinoj ne havas fortojn ĉiam esti bonaj kaj afablaj, sed ili devas iam kaj tiam koleriĝi kontraŭ siaj infanoj. La infana psiko sentas teruran ŝokon kiam la amanta

patrino — aŭ vartistino — subite fariĝas kolera »besto«. Por pli bone rezisti la ŝokon, la infano al kutimigas sin por estontaj similaj situacioj vivante samspecajn okazaĵojn ĉiufoje aŭskultante pri la aminda avino de Ruĝa-ĉapeto, kiu subite ja estas terura lupo.

La ludoj funkcias en precize sama maniero kiel la fabel-aŭskultado. La infano kreas al si paralelon kun la vera vivo, tiel prilaborante — ĉiam senkonscie — siajn proprajn vivproblemojn. Kiam la patro de miaj infanaĝaj najbaroj militmortis, komencis ĉiuj infanoj de la familio ludi enterigaj solenaĵoj kun ĉia militista pompo. La plenaĝuloj estis terurigitaj pro tia infaneca nedececo, sed la infanoj tiamaniere nur penis alkutimigi sin al la fakto, ke la patro jam mortis. Laŭ la Adlera psikologio ili ec iom »kompensis»: ili pretendis, ke **estis bone, ke la patro mortis**, ĉar militmorti estas glora afero! En normalaj okazoj la infanoj kverelas unu kun la alia, ludante »familianoj», ili riproĉas al siaj pupoj, tiel subkonscie riproĉante sin mem pro faritaj aŭ farotaj malbonkondutoj. Spertaj psikoterapiistoj povas gvidi la ludadon de mense flankenevolutaj infanoj tiel reguligante la funkciojn de la infana psiko al pli pozitivaj vojoj.

Kiam ni rigardas ludantan infanon, ni memoru, ke ĝi estas sana kiam ĝi ludas. Ni ne penu malhelpi la ludadon, se ĝi eĉ produktus iom da bruoj, ĉar ludante la infano evoluas al la celo, kiu estas civitano kapabla sin elporti en la ĉiam pli streĉaj situacioj de la homa vivo. Same ni donu al niaj infanoj plejeble multe da mensa nutrado necesa ilia harmonia evoluo; fabelojn kaj rakontojn! Per tiuj ĉi du rimedoj la infano reprodiktas siajn nesolvitajn problemojn kaj prilaboras ilin, tiel proksimiĝante al la fina solvo. Cetere, al sama funkcio celas ankaŭ la sonĝoj, sed pri ili ni rakontu aliffoje.

Arvikolo

† NI FUNEBRAS

La 15:an de januaro forpasis nia ferfora kaj aktiva samideanino Saimi Uuranen en sia 61a vivjaro en Helsinko. Ŝia aktiveco estis konata vaste tra la lando. Kiel kasistino de FLEA kaj estrarano de loka klubo ŝi agis energie dum multaj jaroj.

En la jaro 1938a ŝi aliĝis al niaj vicoj kaj ek de tiu dempo ni vidis ŝin ĉiam kiel sindonan kunlaborantinon. Ŝia hejmo fariĝis nia nesto, kie la aferoj estis forĝataj kaj efektivigataj. Per sia gaja kaj vigla karaktero ŝi havigis grandan amikaron, tiel en senpera proksimeco kiel inter multaj eksterlandaj gesamideanoj. Tion atestas la abunda kolektaĵo de eksterlandaj objektoj, kiu ornamas la hejmon. La unika kolektaĵo vekis atenton de konata kooperativa gazeto, kies redaktoro foje vizitis ŝin kaj faris belan artikolon pri la admirinda lingvo.

Dum la lastaj jaroj Saimi plue aktivis en movadoj de Ruĝa kruco kaj bahaáista. Precipe la laste nomita fariĝis proksima al ŝia koro.

Kvankam ŝia sanstato dum multaj jaroj estis ŝancela ni tamen ne povis atendi tiel subitan foriron. Ŝajne la labortago rompiĝis duonvoje, ĉar la alvoko el eterneco alvenis sen antaŭaverto kiam ŝi parolis telefone kun la gvidantino de baha'a movado.

En vintra, nuba tago la 21:an de januaro okazis la enteriga ceremonio laŭ la bahaáista rito. Belan enterigan parolon faris angla pastoro. En la persa lingvo li kantis longan meson. Fine la tomba altaĵo kovriĝis de multaj florkronoj kaj bukedoj.

Saimi ne plu agas inter ni, sed daŭre brilas ŝiaj agoj en niaj pensoj. Ŝi estis amata homo, nun ŝi ripozu en paco.

Ni direktas nian kondolencon al la vidvo.

K J

VALTIAAN VANHAT

VAATTEET

Kaikki olette jo lapsina kuulleet H. C. Andersenin sadun keisarin uusista vaatteista. Mutta oletteko kuulleet tarinaa valtiaan vanhoista vaatteista? — Ette? — Kertokaamme siis.

Olipa kerran valtakunta ja sillä valtias, joka kaikessa tahtoi vain kansan parasta — siksipä hän ei tahtonut itseään nimitettävän keisariksi, vaan kansanvaltiaaksi. Eipä hän myöskään yksin hallinnut maataan, vaan hänellä oli neuvoskunta kansan viisaimmista miehistä ja naisista.

Heti valtiaaksi päästyään kansanvaltias ryhtyi rakentamaan hyvinvointivaltiota. Neuvosmiesten ehdotuksesta perustettiin kouluja ja sairaaloita, säädettiin tukiaiset, lapsilisät ja eläkkeet ja monet muut kansalaiset, joita emme osaa luetella. Tämä kaikki tietysti kysyi varoja, ja verot kasvoivat kasvamisestaan.

Neuvoskunta huomasi pian tyytymättömyyden alkua, mutta se arveli tämän loppuvan, kun vaan kaikki puute saataisiin poistetuksi. Ja niinpä ponnistuksia rohkeasti lisättiin.

Kaikesta huolimatta asuntoja ei kyetty rakentamaan kaikille, eikä eläkkeitä saatu riittävän korkeiksi. Heikoimmassa asemassa clevat ihmiset näyttivät lisääntyvän nopeimmin . . .

Kun veroja ei enää voitu lisätä, päätti kansanvaltias, että on ryhdyttävä säästämiskampanjaan. Ja se on aloitettava ylhäältä päin.

Valtiaan vaatteet alkoivat olla kuluneet, mutta hän ei suostunut hankkimaan uusia. Rintapieleen tulleen repeämän peitti taitavasti asetettu Kansanavun Ritarikunnan suurtähti — ja samanlainen, vaikka pienempi ilmestyi pian kaikkien

MALNOVA VESTO

DE LA REGNESTRO

Vi ĉiuj jam, kiel infanoj, aŭdis la febelon de H. C. Andersen pri la nova vesto de la imperiestro. Sed ĉu vi aŭdis pri la malnova vesto de la regnestro? — Ne? — Ni do rakontu.

Estis iam regno ka ĝi havis estron, kiu deziris en ĉio zorgi pri la plejbono de la popolo. Pro tio li ankaŭ ne deziris esti nomata imperiestro, sed demokratiestro. Kaj ne sola li regis la landon, sed kun konsilantaro el la plej saĝaj viroj kaj virinoj de la popolo.

Tuj ricevinte la regnon, la demokratiestro komencis konstrui regnon de bonstato. Laŭ proponoj de la konsilantoj estis fondataj lernejoj kaj malsanulejoj, dekrete fondataj subvencioj, porinfanaj subtenoj kaj pensioj kaj diversaj aliaj civitanaj faciligoj, kiujn ni eĉ ne povas specifi. Ĉio tio kompreneble postulis rimedojn, kaj la impostoj kreskadis.

La konsilantaro baldaŭ rimarkis ĝermojn de malkontento, sed ĝi opiniis, ke tio finiĝos, kiam mizero estos forigita. Kaj tial la klopodoj estis kuraĝe akcelataj.

Tamen ne estis eble konstrui loĝejojn por ĉiuj, kaj la pensioj ne fariĝis sufiĉaj. Ŝajnis, ke la homoj en plej malforta situacio plimultiĝis plej rapide . . .

Kiam estis jam neeble plialtigi la impostojn, la demokratiestro enkondukis ŝparokampanjon. Kaj ĝi estu komencata el la supro.

La vesto de la regnestro jam montris eluziĝon, sed li ne konsentis havigi al si novan. Ŝiraĵon en la brustbasko kovris lerte metita granda ordeno de la Kavaliraro de Popola Helpo. Kaj simila stelo, kvankam pli malgranda, baldaŭ aperis sur la brusto de ĉiuj konsilantoj — kompreneble ne senpage, kaj la enkasigita

neuvosmiesten rintaan — ei tietenkään ilmaiseksi, ja kertyneet varat käytettiin kansan hyväksi.

Kun sitten hihansuut alkoivat kukkia, niin ne korjattiin kirjavilla nauhoilla. Samoin housun saumat ja muut purkautuneet ompeleet. Ja kuta kirjavammaksi puku tuli, sitä enemmän se herätti jäljittelyn halua. Uusia ritarikuntia perustettiin ja rahaa kertyi.

Sitten valtiaan puku repesi sauman vierestä. Hätäratkaisuna hän veti päällensä punaisen paidan. Ja kaikki onnittelivat valtiasta uudesta ritarimerkistä — eihän kenenkään sopinut huomata, että punainen läiskä oli vain paidan helmus.

Niin kasvoi paikka paikka päälle ja viereen. Kaikki kansa oppi ihailemaan kansanvaltiaan kirjavaa pukua, ja pyrki itsekin — mikäli laki ja asetukset sallivat — pukeutumaan yhtä kirjavasti, maksoi mitä maksoi. Kaiken huippu oli Häpykannuksen Ritarimerkki, jonka malli periytyi muinaisten faaraoiden ajoilta asti. Sitä kannettiin vyöllä siltä varalta, että housunnapit sattuisivat sinkoamaan irti. (Honi soit qui mal y pense — hävetkää, jos se herättää pahoja ajatuksia!).

Kaikkeen tähän oli vähitellen totuttu, niin että muunlaista pukeutumista ei oikein pidetty sopivana.

Mutta missä ei olisi oppositiota?

Sinne tänne ilmestyi joku kansalainen, joka pukeutui ehjiin koristelemattomiin vaatteisiin. Ja mikä pahinta, he rupesivat puhumaan lähimmäisilleen yksinkertaisen puvun puolesta. He väittivät, että lopulta säästyisi paljon turhia menoja kansalta, jos kaikki ryhtyisivät käyttämään yksinkertaisia, uudesta lujasta kankaasta tehtyjä vaatteita. Ne olisivat myös käytännöllisemmät ja mukavammat. Eikä siinä kyllin. He uskalsivat toivoa, että se kateus, joka repi kansalaisia, kun jokainen pyrki hankkimaan itselleen oikeuden

mono estis uzata por la bono de la popolo.

Kaj kiam la manikrandoj komencis ĉifoniĝi, oni riparitis ilin per koloraj rubandoj. Simile oni plibonigis la kunligojn de la pantalono kaj aliajn malfiksiĝintajn kudraĵojn. Kaj ju pli multkolora la vesto fariĝis, des pli imitinda ĝi ŝajnis al ĉiuj. Novaj ordenoj fondiĝis kaj mono kolektiĝis.

Poste la vesto de la demokratiestro ŝiriĝis apud kudraĵo. Kiel provizora solvo la regnestro surmetis ruĝan ĉemizon. Kaj ĉiuj gratulis la estron pro nova ordeno — al neniu ja decis rimarki, ke la ruĝa makulo estis nur basko de ĉemizo.

Tiel pliĝis flikaĵo sur flikaĵo kaj apud flikaĵo. La tuta popolo lernis admiri la multkoloran veston de la demokratiestro kaj pensis mem — en la kadro de leĝo kaj permesoj — sin vesti same bunte, kostu kiom kostos. La kulmino estis la Ordeno de Hontosprono, kies modelo devenis de la tempoj de antikvaj faraonoj. Ĝi estis portata ĉe la zono pro la okazo, ke la pantalonaj butonoj eventuale eksplode dissaltos. (Honi soit qui mal y pense — hontu, se vi malbone pensas pri tio!).

Al ĉio tia oni kutimiĝis iom post iom, en tia grado, ke alia vestaĵo ne estis konsiderata deca.

Sed kie mankus opozicio?

Ie kaj tie aperis civitano, kiu sin vestis per sendifekta vesto neornamita. Kaj kio estis plej malbone, ili komencis defendi la siplan vestaĵon ĉe siaj najbaroj. Ili pretendis, ke fine la popolo ŝparos sin de senutilaj elspezoj, se ĉiu komencos porti simplan veston, farita el nova, fortika ŝtofo. Tia eĉ estus pli praktika kaj oportuna. Kaj ne nur tio. Ili eĉ kuraĝis esperi, ke la envio, kiu disŝiris la civitanojn, ĉar ĉiu deziris al si la rajton porti pli pompan veston ol la proksimulo, malmultiĝus, se ĉiu vestus sin simple. Laŭ ĉi tiu espero ili eknomis sin

käyttää naapuriaan muhkeampaa pukua, vähenisi, jos kaikki pukeutuisivat yksinkertaisesti. Tämän toivon mukaan he rupesivat nimittämään itseään esperantisteiksi. Aluksi heitä tietysti pilkattiin haaveilijoiksi, keksittiinpä vielä uusi sana, »toiveajattelu», heidän halventamiseksi. Mutta siitä huolimatta kasvoi heidän joukkonsa.

Lopulta esperantit rohkenivat esittää asiansa valtion vaatetusneuvokselle. Lähetystö tuli puhutteluun yksinkertaisiin pukeutuneena, mutta neuvos torjui heidän ehdotuksensa sanoen: Luuletteko todellakin, että yksinkertaisia vaatteita saattaa valmistaa?

»Hyvinvointi»-lehti varoitti lukijoitaan esperanteista: he ovat selvästi vallankumouksellisia. Ja niinpä monet, jotka sisimmässään pitivät esperanttien asiaa järkevänä, vetäytyivät syrjään, eivätkä rohjenneet tunnustautua sen kannattajiksi, vielä vähemmän he uskalsivat pukeutua yksinkertaisiin vaatteisiin.

Järkevää asiaa ei kuitenkaan voi tukahduttaa. Ajan mukaan yhä useammat myönsivät, että yksinkertaiset vaatteet olisivat hyvät, ehkäpä lopulta taloudellisetkin. Mutta niiden käyttöönottoaminen muka liian vaikeaa: Miten saataisiin ritarimerkkien kantajat luopumaan koristeistaan? Ja vaikka heidän sallittaisiin edelleen kantaa niitä, ehjässäkin puvussa, miten saataisiin suuret joukot luopumaan niiden tavoittelusta? Entä yksinkertaisten pukujen valmistus? Eihän meillä ole riittävästi vaattureita, jotka osaisivat niitä valmistaa. Mistä saataisiin koulutusvarat?

Ja niin kansa ja sen valtiot kantavat edelleen kirjavia vaatteita. Kaikki uskovat täten parhaiten tukevan sa kansan hyvinvointia. Eikä kukaan rohkene julkisesti sanoa, että kaikkien vaattet ovat lopen kuluneet, ja että niiden paikkaaminen

esperantoj. Komence oni kompreneble mokis ilin utopiistoj; oni eĉ elpensis novan vorton, "esperpensado", por malhonoru ilin. Sed malgraŭ tio alia anaro kreskis.

Fine la esperantoj kuraĝis prezenti sian ideon al la vesta konsilanto de la regno. La deputitaro venis al la interparolo en simplaj vestoj, sed la konsilanto rifuzis ilian proponon dirante: Ĉu vere vi kredas ke estas eble ellabori simplajn vestojn?

La gazeto "Bonstato" avertis siajn legantojn pri la esperantoj: klare ili estas revoluciemaj. Kaj pro tio multaj, kiuj en sia koro opiniis, ke la esperanta afero estas prudenta, retirigis kaj ne kuraĝis konfesi sin subtenantoj de ĝi, por ne paroli pri sinvesto per simpla vesto.

Prudentan aferon oni tamen ne povas sufoki. Laŭ la tempo pli kaj pli multaj konfesis, ke simplaj vestoj estas bonaj, eble fine eĉ ekonomiaj. Sed ilia enkonduko estas tro malfacila: kiel oni povos rezignigi la ordenitojn pri siaj ornamaĵoj? Kaj eĉ se oni permesus al ili plu porti la ordenojn eĉ sur sendifektaj vestoj, kiel igi la masojn forlasi la deziron pri ordenoj? Plie, la fabrikado de simplaj vestoj? Ja ne ekzistas sufiĉa nombro da tajloroj, kapablaj kudri ilin. De kie preni la rimedojn por ilia instruo?

Kaj la popolo kaj la demokratiestro daŭre portas multkolorajn vestojn. Ĉiuj kredas, ke ili per tio plej bone subtenas la bonstaton de la popolo. Kaj neniu kuraĝas publike diri, ke ĉies vestaĵo estas ĉifone eluzita, kaj ke la flikado per ordenoj fariĝas pli multtekosta ol sendifektaj, simplaj vestaĵoj.

Vilho Setälä.

ritarimerkeillä tulee kalliimmaksi, kuin ehjät, yksinkertaiset vaatteet.

Vilho Setälä.

PARALELAJ KURSOJ

En la du katolikaj esperanto-gazetoj, *Espero Katolika* kaj *Birdo*, proponas sro G. van Dijk paralelajn esperantokursojn por la katolikaj esperanto-organizoj. Li celas al korespondaj kursoj, kiuj estus tute samaj, kaj samtempaj, por ĉiuj lernantoj, sendepende de ilia lando. La ideo estas tia, ke homoj, kiuj ne estas esperantistoj, povus ĝin studi, kaj jam en tre frua stadio de studado ili povus komenci eksterlandan korespondadon, ĉar oni povus establi kontakton kun alilanda kursano ekzakte samnivela. Samtempe kun la studado ankaŭ la lingva nivelo de korespondado progresus. Tiamaniere neniu povus sin senti pli primitiva lingvoreganto ol la kunkorespondanto.

Ni tute samopinias kun sro van Dijk. Lia ideo estas, ke la katolikaj organizoj farus iniciaton kaj komencus la preparajn laborojn por tiaj paralelaj kursoj. Li motivas sian ideon per tio, ke kunmetante la fortojn la katolikaj esperanto-organizoj atingas multe pli bonajn rezultojn en la lernigado de siaj anoj ol estus eble, se ili ĉiulande klopudus aparte al sama celo. Tute prave, sed ĉu ne estus eĉ pli bone, se ni povus esti eĉ tiel unuanimaj, ke ĉiuj esperanto-organizoj sendepende de religiaj aŭ politikaj nuancoj, establu internacian korespondan instituton. Nu, tio ne gravas, ĉar sro van Dijk vere agis. Li proponas en la *Birdo* N:o 10 provan kurson, por scii, kiel ilin aranĝi. Tre laŭdinda ideo! Por uzo ĉe tiaspecaj kursoj oni bezonus internacie taŭgan lernolibron, kiu estus havebla en ĉiuj landoj. Kiel tian li proponas *Privilegian Vojon* de Vilho Setälä. Ŝajnas al mi, ke la ideo estas bona, ĝi verŝajne estas nuntempe la sola taŭga elementa lernolibro por studantoj, kiuj eble ne povas havi personan gvidadon. Sed alia afero estas, kiel organizi

la kurson, ĉar ne ekzistas internacia korespondaj kurso, kiu baziĝus sur »*Privilegia*». Tamen ĝi estas preparata ĉe la *Fondumo Esperanto*, Helsinki, ni ne povas diri kiel longan tempon postulas ĝia finpreparo, ĉar la funkciuloj de la nomita fondumo ĉiuj havas ankaŭ siajn normalajn ĉiutagajn laborojn. Sed laŭ la informo ricevita, ili faras sian plejblon.

La ideo de paralelaj kursoj estas tre bona, kaj ni sincere dankas samideanon van Dijk pro lia bona iniciato. Ni tre interese sekvas la evoluon de la ideo, kaj deziras al ĝi plej bonan sukceson. **A r v i k o l o**

KOMENCA ESPERANTO-KURSO EN HEINOLA

Oni nin informis, ke la 15an de ĉijara januaro komenciĝis porkomencanta esperantokurso en la Laborista instituto de Heinola. Nombro de lernantoj estas pli ol dek, iom variante. Kiel kursgvidanto agas sro Eero Laitinen, kiu modeste mencias sin "malmulte kompetenta kiel instruisto", kiel kurslibro oni uzas *Privilegian Vojon*, kiu ŝajnas esti tre konvena por uzo je tiaspeca lernado kaj instruado.

La malmultaj ĝisnunaj Heinola-aj esperantistoj multe ĝojas pri la kurso, nun oni povas, kiam ekkomencas diskuto pri esperanto, rakonti, ke ekzistas studrondo por komencantoj, bonvenon!

Ni gratulas kaj esperas plenan sukceson kaj daŭrantan entuziasmon por la kursanoj!

KURSGVIDANTOJ!

Ĉiuj kiuj gvidas esperantajn kursojn, studrondojn aŭ instruas ĝin en la lernejo, bonvolu sendi informojn pri la kursa membronombro, frekvenco, studlibro, k.c. senprokraste al la oficejo de Esperanto Instituto, Esperantotie 4, Iirislahti. Informojn ni bezonas por statistiko, kiun U.E.A. faras pri la studado de esperanto en ĉiuj landoj.

S. R.

LASTMOMENTA GRATULO

La 16an de februaro atingis nia samideano Kustaa Viktor Huhtala aĝon de 80 jaroj! La redakcio gratulas al la vera pioniro, kiu fariĝis esperantisto jam antaŭ la unua modmilito, kaj deziras bonegan daurigon.

LETERO DE SRO WOESSINK, ESTRARANO PRI FINANCOJ DE UEA.

Laŭ peto de doktoro Ivo Lapenna ni publikigas komplete kaj senŝanĝe la suban leteron.

ESTIMATA SINJORO SETÄLÄ

En »Esperanta Finnlando», numero 8—9 de 1961 troviĝas sur paĝo 66 artikolo »70-jarulo Hans Jakob», kun subskribo »La Redakcio». En la redakcio troviĝas vi kaj la redaktejo estas je via adreso.

Vi estas komitatano de U. E. A. nomita de la Esperanto-Asocio de Finnlando, aliĝinta asocio de U. E. A.. En tiu kvalito vi ricevas ĉiujn oficialajn dokumentojn de U. E. A., inklusive de raportoj, protokoloj ktp. Vi havas la devon legi ilin, la rajton komenti ilin kaj ankaŭ la rajton fari iujn ajn proponojn. Sed estas via devo disciplinite solidariĝi kun la decidoj de la plimulto.

En la lumo de ĉio ĉi estas senrespondeca misprezento de la aferoj aserti: »Oni diris al ni ke li (Hans Jakob) »eraris». Sed pro eraro oni ne esprimas malkonfidon.» Kial estis esprimita malkonfido, tio estas precize formulita sur paĝo 8 de la protokoloj de la komitatkunsidoj en Harrogate, en lastaj 13 linioj de la unua alineo.

Pri la tuta evoluo, kiu kondukis al tiu ĉi situacio vi ricevis la jenajn dokumentojn:

je 27—6—1960, en la dokumentaro por la komitatkunsidoj en Bruselo:

F1: Financa Raporto Serva Centro,

F2: Raporto de la kontrolintoj Serva kun Komenta Letero de la revizoro de la C. O. (13 paĝa),

Poste:

F3: Raporto al la prezidanto de U. E. A. pri la serva Centro kaj Fondaĵo Hodler, farita de s-ro Woessink, laŭ delego de la tiama prezidanto de U. E. A., prof. Canuto (15 paĝa),

D10: Raporto de la Financa Komisiono en Bruselo (principe ĝia punkto 3),

La protokolo de la komitatkunsidoj en

Bruselo, kiu entenas la punkton sur paĝo 11 kaj 12.

La konfidenca raporto de 31—10—1960 de s-roj Woessink kaj Sturzenegger kaj f-ino Vermaas al la komitatanoj (3-paĝa), je 6—7—1961, en la dokumentaro por la komitatkunsidoj en Harrogate:

F: Raporto pri Ĉenevo kaj propono pri malkonfido,

Poste:

La protokolo pri la komitatkunsidoj en Harrogate kie la temo estas traktita sur paĝoj 6 ĝis 8.

Ĉiu kiu atente legis ĉion ĉi — kaj mi devas supozi ke vi tion faris — povas ricevi bildon pri la situacio. Diri post tio: »Oni diris al ni, ke li eraris», estas pli ol malobjektiva. Ĝi signifas esprimon de malkonfido ne nur al mi sed al la Estraro kaj al la tuta Komitato de U. E. A. Se vi iel dubus pri la raportoj faritaj de mi kaj de mi kune kun s-ro Sturzenegger kaj f-ino Vermaas, vi ĉiam estus povinta fari demandojn al mi kaj mi certe estus respondinta al vi. Sed vi tion neniam faris. Mi nun ne volas eniri la detalojn de la afero, mi nur petas de vi rektan respondon al jenaj demandoj:

1. Ĉu vi, s-ro mag. Setälä konsentas ke la Statuto de U. E. A. ligas ĉiujn komitatanojn, funkciulojn kaj membrojn de U. E. A., jes aŭ ne?

2. Se jes, ĉu vi aprobas ke kontraŭ la decido de la komitato s-ro Hans Jakob rifuzis kaj rizufas transdoni al U. E. A. la posedaĵojn de la asocio, kiuj — laŭ lia propra rekono — estas en liaj manoj, jes aŭ ne?

Vi finas vian arikolon per la deziro ke »Venku la justo kaj humaneco». Mi tre esperas ke vi mem faru ĉion por kontribui al tiu venko.

Por ke la legantoj de »Esperanta Finnlando» estu informitaj, mi vin petas publiki ĉi tiun leteron en la venonta numero, inkluzive de viaj respondoj al supraj demandoj.

Fidante je via lojaleco kiel komitatano de U. E. A.,

sincere via

(E. J. Woessink), estrarano pri financoj.

RESPONDO DE VILHO SETÄLÄ:

Mi petas pardonon, ke mi transpasis la limon de mia kompetenteco. Mi ja estas nur simpla lingvisto-esperantologo kaj verkisto, geografie malproksima, kaj malmulton komprenas pri organizo kaj financoj. Sed min profunde afliktas kaj malĝojigas la fakto ke la personoj, kiuj havas la plej grandajn meritojn pri la prospero de Esperanto ne povas amike kaj pace interkonsenti pri ĉiuj problemoj de la movado, pli aŭ malpli gravaj.

Vilho Setälä.

